



## Enhavo

- AMO 64 virtuala: programo – majo 9
- AMO pluiras virtuale kaj virusteme!
- AMO – horzona gvido
- AMO – resumo de prelego Ilona Koutny
- AMO – resumo de Małgosia Komarnicka

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-22 sendita el Budapeŝto, la 6an de majo.*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 64 v: la fiksita programo – partopreno bonvena!

Tiu sekva Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) okazos en la sekva sabato, la 9an de majo, ekde 14:00 laŭ la irana tempo. Jen la programo, kiel fiksita hodiaŭ:

14:00 – 14:10	Malfermo (SMG – kun propono pri rekomendoj).
14:10 – 14:55	So Ĵin Su (estrarano de UEA): Koreio – ekzemplodona lando.
14:55 – 15:40	Ilona Koutny: Universitata instruado de esperantologio kaj interlingvistiko
15:45 – 16:30	Amri Wandel (estrarano de UEA): La nova pandemia retejo de UEA
16:30 – 17:15	Małgosia Komarnicka: Pollando: Regionaj asocioj levas sin al la nuntempo.
17:15 – 18:00	Forumo: UMEA, ILEI, kaj espereble pliaj Fakaj Asocioj. Gvidos SMG.

30-minutaj prezentoj kun 15 minutoj por demandoj kaj respondoj.

## Tempozonoj:

Abundas retejoj, kiuj donos informojn, se ne aperas via tempozono. Jen ŝlosilo, bazita sur la komenĉo de la seminario.

Irana tempo: ekde 14:00

Centra Eŭropa Somera tempo: ekde 11:30. Por la plimulto de Eŭropo kaj Afriko.

Universala Tempo (UTC), la normo bazita sur *Greenwich (GMT)*: ekde 09:30.

Amerko: Orienta Somera Tempo (EDT): ekde 05:30.

Korea Norma Tempo (KST): ekde 18:30. Valida ankaŭ por Japanio.



Invititoj por AMO 63 v ekster Irano ricevos inviton al la seminario, same la kontribuantoj, kaj ajnaj pliaj homoj ekster Irano, kiuj petas de Stefan MacGill aliron. Irananoj petu al via landa asocio IREA.

De la prelegontoj ni ricevis du resumojn (kaj la plenan prezentaĵon).

## Resumo – Ilona Koutny

La internacia planlingvo esperanto kaj interlingvistiko, malmulte konata branĉo de aplikata lingvistiko, maturiĝis por aperi en universitata oferto. Okazos sistemigo de diversaj universitataj kursoj (lingvokursoj, kursoj pri interlingvistiko kaj internacia komunikado, memstaraj studprogramoj) kaj referenco al kelkaj reprezentantoj. Speciala atento estos turnita al la rolo de esperanto en internacia kaj interkultura komunikado.

La prezentanto rememorigas la unuan memstaran plenan studprogramon en la universitato ELTE (en Hungario) kiu instituciigis esperantologion kiel studdirekton antaŭ pli ol 50 jaroj kaj fokusiĝas al la mem iniciatitaj internaciaj postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en la universitato UAM (en Pollando) kiuj jam de pli ol 20 jaroj formas esperantologojn, interlingvistojn, instruistojn de esperanto. Temos ankaŭ pri la ĉi-rilata scienca kunlaboro inter universitataj kolegoj.



## Resumo – Małgosia Komarnicka

### 1. Enkonduko

### 2. Kio estas la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado? Memstara regiona asocio bazita en Wrocław, Pollando.

**2.1 Niaj agadoj** – ĉiujara renkontiĝo, kantfestivalo, universitataj kontaktoj kma

**2/2 Niaj planoj** – starigo de retaj alternativoj

### 3. Esperanta Rotaria Klubo – ligita al RADE: prezentado kaj agadoj

### 4. Juna Amiko – agoj kaj planoj – ideoj de rubrikestro de la revuo de ILEI.

### 5. Konkludoj



Vortoj nun: 520

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.